

Theodor Körner,

Am-ebrio

tradukita de Manfred Retzlaff

Al vi, knabino, vibretante
 Albatas nur la kor' en mi,
 En am', fidele vin celante,
 Mi strebas nur al vi.

Nur via nom' kun sankta sono
 Ja pleniginta estas min;
 En bril' de belo kaj de bono
 Mi ĉiam vidas vin.

La am' el ĝermo delikata
 Elkreskis kaj ne velkas ĝi,
 En miaj songoj, amegata
 Knabino, vivas vi.

La kordojn batas mi, fluadas
 Entuziasmo super min;
 La kantoj, kiujn mi kantadas,
 Tutsole nomas vin.

Mi sentas, se vi min rigardas
 En paradizo kvazaŭ min.
 Ĉielo mia tiam ardas
 Ĉe via dolĉa sin'.²

Por ĝojo kaj pro am-doloro
 Sapiro sola nur en mi,
 Nur unu pens' en mia koro:
 Ah, estu mi ĉe vi!

*Traduko de la Germana poemo "Liebesrausch" de Theodor Körner en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-06-20.*

MR-155-1 / Arg-764-1535 (2013-01-06 22:56:18)

²aŭ:

Je vi amplene mi rigardas,
 En paradiz' mi sentas min,
 Ĉielo mia rave ardas
 Ĉe via dolĉa sin'.